# LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 1, nummer 3, september-oktober 2008
Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.
Erkenningsnummer: P808228
V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, 3940 Hechtel-Eksel
Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter.doumen@skynet.be

# LA PONTO

Dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (LEA)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.
Jarkolekto 1, N-ro 3 : septembro-oktobro 2008
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter.doumen@skynet.be

## Redaktore…

*Karaj Gelegantoj,*

*Por la plej multaj el ni la ferioj jam estas pasintaj. Se vi restis en la lando aŭ feriis eksterlande, mi esperas, ke vi bone malstreĉiĝis kaj amuziĝis. Nur unu persono sendis al ni salutojn kaj fotojn de sia restado kun sia familio eksterlande. Dankon, An Olijslagers!*

*Laŭ peto de la estraro de LEA mi sendis poste 'La Ponton' (la numerojn 1 kaj 2) al ĉiuj klubprezidantoj kaj aliaj gravaj esperantistoj en Belgio. Entute mi sendis 53 ekzemplerojn : 33 retpoŝte kaj 20 paperpoŝte. Dek du personoj kiuj ricevis ilin, sendis al ni gratulojn pro nia iniciato. Ni estas kontentaj, ke ni povas plezurigi ĉiujn belgajn esperantistojn per nia modesta revuo. Nia cela estas, ke ĉiuj ricevantoj iel povos ultiligi ĝin por la bono de Esperanto kaj Esperantio. Rimarkoj kaj konsiloj ĉiam estas bonvenaj!*

*Mi deziras al vi agrablan legadon!*

*Jan Doumen*



**An Olijslagers kaj ŝia edzo feriantaj sur Kreto.**

## UEA centjara *(daŭrigo)*

*(Honderd jaar UEA - vervolg)*

La disduiĝo de la movado okazis en 1936, ĝuste en la tempo, kiam Germanio kaj Sovet-Unio malpermesis la organizitan agadon por Esperanto. UEA kaj IEL estis kvazaŭ paralizitaj pro malfavoraj cirkonstancoj en multaj landoj. La principo de neŭtraleco eĉ ŝajnis malebligi ĉiun proteston kontraŭ la persekutoj.

Ekde 1938 la movado tamen rekonsciiĝis pri sia rolo. La juna jugoslava Prof. Ivo Lapenna fervore defendis la internan ideon de Esperanto dum la 30-a UK en Londono (1938) kiel sintenon kontraŭ la malamikoj de amikeco, toleremo kaj demokratio. Lia sukceso estis granda. Tiel komenciĝis la multjara kariero de Lapenna, sub kies prezidanteco poste la movado aliris periodon de granda prospero.

Unu jaron poste la Dua Mondmilito eksplodis. Hitler, kiu konsideris Esperanton kiel judan konspiron periigis ĉiujn membrojn de la familio de D-ro Zamenhof escepte de lia bofilino Wanda kaj lia nepo Louis Zaleski-Zamenhof kaj detruis la familidomon. Multaj esperantistoj mortis en koncentrejo. IEL kaj UEA denove organizis helpagadon, kiu, eĉ se pli modesta ol dum la Unua Mondmilito, denove demonstris la volon de la esperantistoj batali por pli bona mondo.

Nelonge post la milito UEA kaj IEL, komencis intertraktadi pri sia reunuigo. En aprilo 1947 UEA estis konfirmita kiel la sola internacia asocio kun strukturo simila al tiu de IEL. Oni fine komprenis, ke landaj asocioj kaj internacia asocio povas kompletigi sin. La persekutoj kontraŭ la Esperanto-movado konsciigis la novan asocion pri la limoj de neŭtraleco. Ĝi tuj aliĝis al la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Oni preskaŭ tuj startis kampanjon por ricevi la rekonon de la Unuiĝintaj Nacioj. Fine de 1954 Unesko rekonis en rezolucio la atingojn de la Esperanto-movado kaj komencis konsultajn rilatojn kun UEA. Tiu 'venko de Montevideo' estis persona atingo de Lapenna. La dua kampanjo en 1965-1966 bedaŭrinde malsukcesis. Ĝi petis, ke UN rekomendu al siaj ŝtatoj-membroj enkonduki la lernadon kaj uzon de Esperanto. UN rifuzis pritrakti la peton.

Ivo Lapenna, ĝenerala direktoro de 1955 ĝis 1964 kaj poste prezidanto de UEA de 1964 ĝis 1974, estis la motoro de la konstruo de tio kion li nomis 'la moderna

UEA'. Li estis la iniciatinto de i.a. la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), la Belartaj Konkursoj dum la UK-oj, la libroserio Oriento-Okcidento, la scienca revuo *La Monda Lingvo-Problemo*, la Korespondan Servon Mondskalan kaj la TEJO-revuo *Kontakto.*

En novembro 1955 la Centra Oficejo de UEA estis translokita al Roterdamo. En 1961 la asocio aĉetis tie sian propran domon ĉe la strato Nieuwe Binnenweg, kie ĝi ankoraŭ ĉiam havas sian sidejon.

Lapenna ne nur estis elstara organizanto, li ankaŭ estis granda oratoro, kiu kapablis entuziasmigi sian aŭdantaron. La nombro de la membroj daŭre kreskis (de ĉ. 16.200 membroj el ĉ. 60 landaj en 1947 al 33.953 en 83 landoj en 1965).

*(Daŭrigota – J.D.)*

## Programo de LEA 2008-2009

*(Programma van LEV 2008-2009)*

*La estraro de LEA proponas la sekvan programon al la membroj de LEA por la venonta laborjaro. Rimarku ke, pro cirkonstancoj, la kunvenoj okazos la lastan **merkredon** de septembro kaj oktobro, kaj la lastan **ĵaŭdon** de la monatoj novembro ĝis junio inkluzive.Cetere povas esti kaŭzoj sendependaj de nia volo pro kiuj ni devas ŝanĝi la programon. Sed ĉiu ŝanĝo ĉiam estos ĝustatempe anoncita.*

**Merkredon** la 24-an de septembro 2008 :
Prelego de Jan Doumen pri la Universala Esperanto-Kongreso en Roterdamo.
**Merkredon** la 29-an de oktobro 2008 :
Prelego de André Staes.
**Ĵaŭdon** la 27-an de novembro 2008 :
Vortludoj « Boggle », Pendumito gvidota de An Olijslagers.
**Ĵaŭdon** la 18-an de decembro 2008 :
Zamenhoffesto aranĝota de Henri Schutters kaj Jan Doumen.
**Ĵaŭdon** la 29-an de januaro 2009:
Kantovespero gvidota de Jan Doumen kaj Paul Hotterbeekx.
**Ĵaŭdon** la 26-an de februaro 2009:
Kvizo, gvidota de Henri Schutters.
**Ĵaŭdon** la 26-an de marto 2009:
Prelego de Yves Nevelstaan pri Vikipedio.
**Ĵaŭdon** la 30 de aprilo 2009:
Skrablo, gvidota de An Olijslagers.
**Ĵaŭdon** la 28-an de majo 2009:
Kartludo en Kafejo Esperanto, Eisden.
**Ĵaŭdon** la 25-an de junio 2009:
"Kion vi legis lastatempe?" gvidota de An Olijslagers kaj Jan Doumen.
**Kaj**: Kajaki sur Dommel, aranĝota kaj gvidota de Paul Hotterbeekx, sperta kajakisto kaj kajakĉampiono. La dato ankoraŭ ne estas fiksita, sed tio okazos iun sabaton.

## Novaĵoj el Esperantolando

*(Nieuws uit Esperantoland)*

**Ĉinio** – 290 ĉinaj studentoj komencis lerni Esperanton en la lernojaro 2008 de la universitato de Nanchang. Prof. Gong Xiaofeng (Arko) gvidas tiun kurson dufoje semajne. Esperanto estas instruata oficiale kiel nedeviga studfako. Al la finlernantoj la Jianĝia Esperanto-Asocio donos atestilon kaj aligos la aktivajn lernantojn kiel membrojn. Nun tiuj lernantoj volas fondi novan Esperanto-asocion de studentoj por pluaj aktivaĵoj en kaj pri Esperanto. *(Arko)*

**Ĉinio –** En la universitato de Nankino estis organizita, eble por la unua fojo en profesia lingvotestado, testo, kiu okazas plejparte en Esperanto, pri la kapableco lerni fremdan lingvon en posta lingvokurso. Jen do alia uzo de la Internacia Lingvo ! La ideo venis de S-rino Cui Jianhua, vicestrino de la fako pri aplikataj lingvoj en la universitato de Nankino, unu el la plej prestiĝaj universitatoj en Ĉinio. La konkreta realigo de la ekzamenoj kaj la enhavo de la testo venis de Dennis Keefe. Li jam provis teston kun 18 gestudentoj, kaj pro la sukceso de la provoj la universitato decidis hodiaŭ starigi dek novajn testsesiojn en julio. La testo parte baziĝas sur la principoj de la Baza Esperanto-kurso (BEK : laŭŝtupa progresigo, aktiva kontrolo post instruado, ktp.), kaj speciale baziĝas sur la ekzercaro PEPAS (modifita BEK kiu pli fidele spegulas la lernadstilon de la plej multaj Aziaj lernantoj). La enhavo de la testo ŝanĝiĝas ĉe ĉiu apliko.

*(Dennis Keefe)*

**Germanio** – La 12-an de julio 2008 ni festis la 2-an datrevenon de la naskiĝo de Herzberg am Harz kiel Esperanto-urbo. Ĉirkaŭ 50 personoj el 15 landoj festis kune. Honoraj gastoj estis la prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio, D-ro

Rudolf Fischer, kaj la urbestro, Gerhard Walter, kiuj afable salutis kaj bondeziris. En la nomo de la Germana Esperanto-Centro Peter Zilvar transdonis al la urbestro grandan memormedalon kreitan de la germana medalisto Peter Götz Güttler el Dresdeno. En la fino ni gustumis komune bongustan naskiĝtorton. Ni dankas pro la multaj gratulleteroj. Dum la sekvanta tre sukcesa Kulturturisma Semajno okazis multaj interesaj prelegoj kaj eksursoj. *(Interkultura Centro Herzberg am Harz)*

**Svislando** – La 24-an de aprilo okazis io eksterordinara por Esperantio : Dietrich Michael Weidemann, kunprezidanto de la Svisa Esperanto-Societo (SES) faris paroladon en Esperanto dum simpozio de UN en Ĝenevo. Li aludis pri la grava rolo de la ĝenevanoj Edmond Privat kaj Hector Hodler ĉe la fondo de Universala Esperanto-Asocio, kies centjariĝon oni festis ĉi-jare kaj kiu defendas la Homajn Rajtojn ekde sia starigo. Li memorigis pri la propono de Privat al la usona prezidento Wilson krei Tutmondan Federacion de ĉiuj ŝtatoj surbaze de la Homaj Rajtoj, ideo kiu poste realiĝis per la starigo de la Unuiĝintaj Nacioj. Weidemann atentigis la ĉeestantojn pri tio, ke la Homaj Rajtoj postulas egalecon  por ĉiuj homoj kaj la eblecon defendi tiujn rajtojn en sia propra lingvo. Lingva egaleco apartenas do al la Homaj Rajtoj. Ankaŭ UEA kaj SES laboras por la realigo de tiu idealo tute kiel UN kaj Unesko.    *(Informo de Stefano Keller)*

**Hungario** – Ekde kelkaj semajnoj funkcias nova *Esperanta televida stacio* en la interreto ĉe http://esperanto-tv.com !! La portalo "Esperanto-TV" mem ne produktas novajn filmojn, sed ofertas naŭkanalan programliston enhavantan multajn interesajn filmojn, troveblajn dise en pli-malpli kaŝitaj anguloj de la interreto. La programo de la portalo "Esperanto-TV" ŝanĝiĝas laŭ la disponeblo de novaj (bonkvalitaj) filmoj. La nuna programlisto enhavas :
* Esperantista-TV, Esperanto.TV
* ITV, Internacia.TV
* Farbskatol, Farbskatol.net
* Bildo-Televido
* ETV, Esperanto-TV.com
* Esperanto TV (mogulus), mogulus.com/Esperanto
* Esperanto 2.0 TV, worldtv.com/esperanto_2.0_tv
* Esperanto TV (ITVC), itvc.pl
* Parolu Mondo

La portalo ofertas ne nur interrete spekteblajn programojn, sed – kun eksperimenta karaktero – ankaŭ poŝtelefonan Esperanto-televidon!
Por pridiskuti la novajn filmojn kaj programerojn ekzistas diskutlisto http://groups.yahoo.com/group/Esperanto-TV .
Por kontakti la funkciigantojn uzu tiun saman diskutliston aŭ skribu al la adreso esperanto-tv-owner@yahoogroups.com .
*(Szilvási László)*

## Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo

*(Esperantowereldcongres te Rotterdam)*

De la 19-a ĝis la 26-a de julio kolektiĝis 1841 geesperantistoj el 73 landoj en la Borso WTC (Monda Komerca Centro) en Roterdamo por ĉeesti la ĉiujaran Universalan Kongtreso de Esperanto kaj samtempe festi la centjariĝon de UEA.



Kongresejo : Borso WTC Roterdamo

La temo de la kongreso estis: «Lingvoj : trezoro de la homaro». Ankaŭ du LEA-anoj, Jan Doumen kaj Rik Leijskens, partoprenis en ĝi. La solena malfermo okazis dimanĉe je la deka en la granda salono *Hodler*, kiu povis enteni nur 800 personojn. La aliaj sekvis la ceremonion en la salono Uitterdijk sur pluraj grandaj ekranoj. Lunde, marde, ĵaŭde kaj vendrede la partoprenantoj povis ĉeesti pli ol 90 prelegojn, kunvenojn kaj koncertojn en entute 15 salonoj. En la salono *Bulthuis*

okazis daŭra ekspozicio de esperantaj libroj kaj muzikaĵoj, kiujn oni povis aĉeti. Merkrede estis kiel ĉiam la ekskursotago, en kiu okazis pluraj ekskursoj tra Nederlando. Ankaŭ antaŭ kaj post la kongreso okazis ekskursoj. Vendrede vespere okazis la Internacia Arta Vespero en la salono *Zamenhof*, dum kiu multaj amatoraj artistoj aŭdigis muzikon aŭ vidigis dancojn el sia lando. La solena fermo de la kongreso okazis sabate je la deka. Je la 14.00 h la kongresejo fermiĝis. *J.D.*

## Internacia Junulara Kongreso (IJK) *(Internationaal Jeugdkongres)*

Inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto okazis la IJK en Szombathely (pron. Sombathej). Aliĝis 485 personoj. Partoprenis 365 personoj el 36 landoj, 164 viroj kaj 201 virinoj. La plej aĝa partoprenanto havis 74 jarojn, la plej juna 2 jarojn. La preparo kaj surloka realigo de IJK okazis per vere internacia junulara kunlaboro, en kiu partoprenis ankaŭ Carsten Mischke el Belgio. Dum la kongreso okazis plenŝtopitaj kunsidoj de la Komitato de TEJO, kiu festis sian 70-jaran naskiĝdatrevenon. Ĉiuj partoprenantoj povis preni pecon de la granda 400-persona jubilea TEJO-torto kaj tosti per speciala verda Esperanto-ĉampano ! En la kongresejo kaj la studenthejmo funkciis senpaga radia interretkonekto. La vesperaj programoj okazis en la najbara teatra salono. La 6-an de aŭgusto okazis Esperanta Gulaŝ-Kunveno en la ĝardeno de la Budapeŝta Esperanto-Domo, kie 35-40 partoprenintoj estis regalitaj per tipaj hungaraj manĝaĵoj.

*(Szilvási László)*

## Gramatika**ĵo** : La participoj

*(Spraakkunst: De deelwoorden)*

Esperanto havas aktivajn participojn finiĝantajn per –nta, kaj tri pasivajn finiĝantajn per –ta. Ĉiu el la du grupoj havas tri formojn: imperfektan, perfektan kaj planitan[1].

| | Aktiva | Pasiva |
|---|---|---|
| Imperfekta | -anta | -ata |
| Perfekta | -inta | -ita |
| Planita | -onta | -ota |

Nur la konjugaciita verbo ĉiam indikas la tempon de la ago[2]. Participo neniam indikas tempon (prezencon, preteriton, futuron), sed nur temporilaton. Ĝi indikas, ke la ago de la participo respektive daŭras, estis plenumita aŭ ankoraŭ plenumota en la momento indikita de la konjugaciita verbo en kiu ajn tenso ĝi estas.

Ekzemploj de aktivaj participoj :
*Mi estas manĝanta: ik ben aan't eten.*
*Mi estis manĝanta: ik was aan't eten.*
*Mi estas manĝinta: ik ben klaar met eten.*
*Mi estis manĝinta: ik was klaar met eten.*
*Mi estas manĝonta: ik ga eten.*
*Mi estis manĝonta: ik ging eten.*

Ekzemploj de pasivaj participoj:
*Mi estas pagata: ik word betaald.*
*Mi estis pagata: ik werd betaald.*
*Mi estas pagita: ik ben betaald.*
*Mi estis pagita: ik was / werd betaald.*
*Mi estas pagota: ik ga betaald worden.*
*Mi estis pagota: ik ging betaald worden.*

La ĝusta uzo de la participoj finiĝantaj per –ata kaj –ita ofte kaŭzas problemojn. Ĉu uzi –ita aŭ –ata? Kion diras pri tio D-ro Zamenhof mem?

"Kiel principon ĝeneralan por –ata, prenu: ke tempo estanta ekzistas vere nur, kiam la ago aŭ stato daŭras sufiĉe. En alia kondiĉo la ago aŭ stato jam finiĝis, kiam ni parolas pri ili; sekve [tiam] ni ne povas uzi –ata, sed devas uzi –ita. Tiel same se ni parolas ne pri la malvolvado de l'ago, sed nur pri ĝia rezultato (Ekz.: *la proksiman lundon mi estos kunvokita kiel membro de la kriminala juĝantaro*) mi uzos –ita ne –ata." ('Leteroj de L.L. Zamenhof', I: *Letero al de Beaufront de la 23.02.1901)*

[1] 'Futura participo' ne taŭgas ĉar tiu termino indikus tempon.

[2] Tio ne estas la kazo en la nederlanda; tiel *Hij is vertrokken* indikas pasintecon kvankam la konjugaciita verbo estas en la prezenco.



Dr. L.L. Zamenhof, kreinto de Esperanto.

Alie dirite, daŭroverbojn, t.e. verboj kies ago per sia signifo daŭras (ekz. ami, koni, interesi), oni trovas ĝenerale kun –ata, ekz. *amanto, konato, interesatoj*.
Punktoverboj, t.e. verboj kies ago estas mallonga (ekz. *nomumi, elekti, mortigi*) ĝenerale finiĝas per –ita, tiel indikante la rezulton de la ago, ekz. *Li estis elektita prezidanto. Li estis mortigita en batalo.*
Ĉiuj verboj tamen alprenas –ata, se la ago estas *ripetata* (kutimo), ekz. *La membroj ĉiam estis invitataj per letero, sed ĉi-monate ili estis invititaj per retmesaĝo.*

Ekzemploj :
*la bezonata mono, ŝatata okupo, amata amikino, multe vizitata loko, atendata vizito, sciata fakto, konata persono ; forgesita ofendo, venditaj aŭtoj, fermita pordo, aĉetitaj varoj ; esplorata lando – esplorita lando, serĉata libro – trovita libro, skribata letero – skribita letero, ŝuldata sumo – pagita sumo, farota vizito – farita vizito, pagota fakturo – pagita fakturo.*

## La interreto en Esperanto

*(Het internet in het Esperanto)*
Kelkaj interesaj ligoj por esperantistoj: vidu (kaj ridu)!
**Muziko**
http://ikso.net/kantaro/
**Radio**
http://la-ondo.rpod.ru/
http://radioverda.com/
http://www.podfeed.net/category_item.asp?id=4557
http://esperanto.cri.cn/
http://www.polskieradio.pl/eo/
http://www.radiovaticana.org/esp/on-demand.asp
**Novaĵoj**
http://eo.mondediplo.com/
http://www.raporto.info/
http://www.liberafolio.org/
http://esperanto.cri.cn/newindex.htm
*(An Olijslagers)*

## Iomete pri libroj en la interreto

*(Iets over boeken op het Internet)*
Mi ŝatas legi, kaj mi legas multe en Esperanto. Por vi, komencantoj, mi klopodas ĉiu-foje skribi kaj raporti pri iu libro kiun mi legis. Mi esperas, ke vi ankaŭ volas legi tiujn librojn. Mi komencas per libroj facilaj, kaj mi klopodas priskribi librojn de malsamaj ĝenroj. La libro de ĉi tiu numero estas:

La viro kun la tordita lipo
de Sir Arthur Canon Doyle
esperantigita de Syl van Zaft
(http://homepage.mac.com/sylvanzaft/rakontoj/lipo.htm)
*(viro.pdf: sendu retmesaĝon al* a.olijslagers@tiscali.nl kun temo viro.pdf)

La libro estas mallonga rakonto pri Sherlock Holmes. Iu viro malaperis, kaj oni suspektas kriplulon de murdo. Sed oni ne trovas la murditon… Kiel ĉiam Sherlock Holmes solvas la murdon kun la helpo de Watson. La fino estas surpriza kiel en ĉiu bona libro .
La libro ne estas tro longa (36 paĝoj), la uzataj vortoj ne tre malfacilaj. Mi ŝatas la detektivajn rakontojn. Preskaŭ ĉiam ili estas tre longaj, por pligrandigi la tension. Sed ĉi tiu libro havas tension, sed ne estas tro longa por komencantoj.
Mi legis –legas, legos – ĉiun libron kun nomoj kiel
Sherlock Holmes (Sir Arthur Canon Doyle)
Hercule Poirot (Agatha Christie)

Miss Marple (Agatha Christie)
Jules Maigret (Georges Simenon
De Cock (A.C.Baantjer)
Inspector Clouseau (Pink Panther)
Inspector Morse (Colin Dexter)

*(An Olijslagers)*

## Tria Esperanta esplorado de Helmondo *(Derde Esperantoverkenning van Helmond)*

Denove okazos Esperantotago en Helmond (Nederlando) je sabato la 13-a de septembro 2008. Post ekskursoj en la centro kaj al nova kvartalo Twan kaj Rolph volas vizitigi al ni kelkajn specialajn lokojn en la ĉirkaŭaĵo. Ĉi-jare ili faris programon kune kun esperantistoj el Nuenen kaj Eindhoven kun la celo krei agrablan okazon renkonti unuj la aliajn kaj babili Esperante. Speciale ili volas montri al vi la ruran medion de Vincent van Gogh en kaj ĉirkaŭ Nuenen. La programo komenciĝas je la 10.30h kaj finiĝas je la 17.00h, escepte por tiuj kiuj volas resti vespermanĝi. La programo estas senpaga escepte de la vespermanĝo. Tagmeze ili ofertas al vi senpagan piknikon en la Parko.
Aliĝo antaŭ la 6-a de septembro per mesaĝo al [info@twangremmen.nl](mailto:info@twangremmen.nl) aŭ +31-492.544.472 enhavanta viajn nomon, retadreson aŭ telefonnumeron, la nomojn de akompanantoj kaj partoprenontoj en la vespermanĝo.Ni estos feliĉaj (re)vidi vin!

*(Ru Bossong, Eindhoven)*

## Robert Kennedy por Esperanto

La usona demokrato Robert Kennedy, pli juna frato de la fama prezidento John F. Kenndy kaj ties ŝtatsekretario de justico, estis konvinkita favoranto de la internacia lingvo Esperanto. Li diris, ke la lingvo estas la plej grava politikisto de lia tempo. Liaopinie la lingvo plibonigos la mondvastan komunikadon kaj alportos pacon. Bedaŭrinde li mortis en sia 43-a jaro la 3-an de junio 1968, unu tagon post mortiga atenco je lia vivo, dum li kampanjis por la prezidentkandidateco de la demokrata partio. La tuta mondo reagis ŝokite. *(Het Belang van Limburg, 03.06.2008)*



## Vorteto de la prezidanto
*(Woordje van de voorzitter)*

Karaj Geamikoj, mi esperas, ke vi ĝuis la pasintajn somerferiojn surloke aŭ eksterlande malgraŭ la ofta malbona vetero.

Mi volus fari al vi kelkajn komunikojn:
1. Rik Leijskens (kasisto) kaj Jan Doumen (sekretario) ĉi-jare partoprenis la Universalan Esperanto-Kongreson en Roterdamo (inter 1841 gepartoprenantoj el 73 landoj.
2. Dum la kongreso Jan Doumen ricevis honoran mencion kaj diplomon pro sia eseo “Lingvo: trezoro de popolo”.
3. Mi enkondukis kalendaron de eventoj en la retpaĝon de LEA sub la litero ‘E’. Se vi volas anonci eventojn, bonvolu sendi mesaĝon al [henri.schutters@skynet.be](mailto:henri.schutters@skynet.be) .
La adreso de retpaĝo estas :
[http://users.skynet.be/sky53810](http://users.skynet.be/sky53810) .
4. La 23-an kaj 24-an de aŭgusto mi partoprenis la konkurson «Juvelo de la Filatelio» en Tongeren kun kolekto de Esperanto-filatelaĵoj. Pli ol mil personoj vizitis la ekspozicion kaj rigardis samtempe belegan flortapiŝon.

Henri Schutters